# La Juna Batalanto

**Organo de la Internacia Katolika Junulmovado**

Eldonata de Mondjunularo Katolika
(MOKA, IKA-Junularo) Aldono al Katolika Mondo

Redaktoro : Wilh. SOLZBACHER
Neuss a. Rh. Germ. Spiesgasse

N. -o. 4

OKTOBRO 1926.

**Por Universala Solidareco de la Katolika Junularo !**
**Por la Paco Internacia ! Por Sociala Justeco ! Por Nova Homo kaj Nova Homaro !**

## PRI LA LABORO

Kamaradoj ! Ĉu ne, ni parolas kelkfoje pri tio, kio estas en ni kaj brulas kaj premadas, plej ofte ankoraŭ malcerte kaj senforme, pri la nova homo, la nova tempo, kiun ni volas krei kaj formi ne nur en ni, sed ankaŭ ĉirkaŭ ni, en la socia vivo. Tio estas bona ; ĉar ĝi devas esti dirata. Sed, kaj ĉi tio estas grava, ĉu ni ankaŭ agas laŭ tio ? Ĉu la «alia» mondo fakte sentas la aktivecon de nia ĉeesto per nia laboro en la ekonomia, en la politika, en la sociala vivo ?

Regardu la amason en la urbo, en la granurbo. Kiel ĝi ĵetas sin post la labor-kaj servtempo en siajn « refreŝiĝojn », en la kinemon, la kabaredon, en la sportsensacion, kiel ĝi estas influata per la modo, per la sugestio de la ordinaraj demagogoj ! La homoj de niaj tagoj fariĝis amaso pli ol iam. Sed kiel fariĝos denove « popolo », ĝoje kreanta, certa, kuraĝa, interne libera kaj per tio efektive religia popolo, vera popoleco ?

Vi, kamarado, speciale vi, kiu iam volas aŭ devas fariĝi gvidanto, ie en la publika vivo, kiel kaj kion vi laboras por tio ?

Vidu, la plej multaj reformprovoj, kiel ajn bona estis ilia intenco, malsukcesis, ĉar la homoj ne estis laŭ tio. La spirita sintenado de la homoj decidas.

Vi, kamarado, provu do gajni kontakton al la homoj de via ĉirkaŭaĵo, hejme, en la laborejo, en la kontoro, en la fabrikejo, kie vi staras. Provu foje, gajni koran kaj kamaradan konfidorilaton al ili. Estos malfacile ; ĉar vi devos konsenti multe, vi devos povi silenti kaj paroli, devos atenti. Sed kredeble vi iom post iom gajnos teron, fundon sub viaj piedoj. Vi tiam eble eltrovos la specialan kaj bonan, kiu al ĉiu homo iel estas donita. Helpu, ke tio evoluu kaj kresku. Ke la homoj antaŭsentu kaj sentu kaj lernu uzi sian memstarecon en siaj kapabloj.

Provu, ankaŭ se ĝi ofte ŝajnas esti sensukcesa. Ankaŭ tio estas necesa kelkfoje. Kaj vi ja volas fariĝi gvidanto. Sed tio signifas servi, donante kaj helpante forgesi vin mem, pensi nur al la aliaj.

Venu, kamarado, ni iru al la laboro, por ke ankaŭ **reale** la nova tempo fariĝu !

Leo Fleischer (Geldern).

## SANKTA FRANCISKO INTER NI

Ofte mi imagis, ke la Poverello estas inter ni kaj iras kun ni, la nova junularo, kiam ni marŝas tra la lando, en la okuloj la sunon kaj en la koroj la ĝojon.

Francisko, suno, ĉielo kaj simpleco estas en li kaj tiom profunda sindono al la eternaj aĵoj.

Venu, fratoj kaj fratinoj, ni iru kun li, li portu nian standardon, ĉar li estas *nia* Francisko.

Kaj sur la standardo estas skribite : simpleco kaj malriĉeco. Ni volas liberiĝi de la [illegible] balasto, kiun la homoj eltrovis, por turmenti unu la alian kaj sin mem, kiu forprenas de ili la ĝojon kaj tiras ilin en la koton. Ni volas scii kiel li, ke ĉio per si mem estas malsaĝa, vanta kaj senvalora kaj ke en la aĵoj nur estas valoro per la celado al la eterna. Ni volas esti simplaj en nia koro. Kaj ni volas forĵeti kiel li la amuzojn, modovestojn kaj ĉiujn senvaloraĵojn, kiujn la mondo fiere nomas « civilizo », kaj ne volas lasi nin ĝeni per la moko de la «aliaj».

Kaj sur la standardo estas skribite : ĝojo. La ĝojon ni volas porti profunde en nia koro kaj neniam perdi ĝin. Kiel frato Francisko ni volas ĝoje ami ĉiujn homojn kaj la bestojn kaj la kreskaĵojn kaj la naturon kun